# VERDA INFORMILO, n-ro. 5/2018, 28a de majo 2018
# GRÜNER BOTE, 5/2018, 28. Mai 2018

**estas la oficiala informilo de estraroj de Landa Asocio Meklenburgio-Antaŭpomerio (LAMA) kaj Esperanto-Societo Neubrandenburg (ESN)**
**ist das offizielle Mitteilungsblatt der Vorstände des LVMV und EVN**
**www.esperanto-nb.de, info@esperanto-nb.de**

# 1. Societa kunveno en majo 2018

La **30-an de majo 2018** okazos nia societa kunveno en la gastejo „Uns Eck".

Temaro:

- Ŝtetina Esperanto-Printempo
- Festo de demokratio, informstando la 1-an de majo
- Germana Esperanto-Kongreso
- Ondo-Esperanto
- Kiu estis kie? (EH en pollando, NP en Kievo)
- Esperanto-Fervojista kongreso sur Dars
- 53-a kurseto en oktobro
- Lingvaj ekzercoj

# 2. Videoj kaj fotoj pri ŜEP

La 21-an de aprilo 2018 Brunjo iomete filmis dum ŜEP en Ŝtetino. Kaj Reneo enretigis du videojn sur la jena paĝo http://esperanto-nb.de/kalendaroj/jam_okazis2.html (La ligilo ŝanĝiĝos en januaro 2019!)

Jen du fotaroj pri ŜEP:

- http://esperanto-nb.de/esn/fotos_201804_brunjo.php
- http://esperanto-nb.de/esn/fotos_201804_vernereto.php

Jen iomete la kulminoj de la programo.

- Vendrede je la 19-a horo ni partoprenis koncerton en la Filharmonio de Ŝtetino.
- Sabate ni vizitis vojevodian policejon, kies konstruaĵo jam delonge estas uzata kiel policejo.
- Krome okazis ĉambra muzikkoncerto de ĉarma violona kvarteto, prelego de Roman Dobrzyśnki pri sia libro „Zamenhof en Varsovio“, prezentiĝo de „Szczecinianie“ kun popolaj kantoj kaj dancoj, prezentado de Tai Ĉi kaj esperantaj kantoj.

La germanoj partoprenis la aranĝon okope, el la urboj Ŝverino (2), Neubrandenburg (4), Neustrelitz (1)  kaj Prenzlaŭ (1).



*Abbildung 1: Prezentiĝo de „Szczecinianie“ kun popolaj kantoj kaj dancoj*



*Abbildung 2: Ĉarma violona kvarteto*




*Abbildung 3: Kvaropo el Neubrandenburg*



*Abbildung 4: Okopo el Meklenburgio kaj norda Brandenburgio*

7 el la okopo estas el Meklenburgio kaj la ĉarma virino en la malfono estas el Brandenburgio.

La aŭtoro de la informilo tenis verdan flagon :-)

# 3. Societa kunveno en junio 2018

La **27-an de junio 2018** okazos nia societa kunveno en la gastejo „Uns Eck“.

# 4. Invito al Krakovo

Vernereto sendis la jenan inviton retpoŝte:

Estimataj geamikoj, Ni invitas Vin partopreni en la 31-aj Esperantaj Tagoj de Krakovo, kiuj okazos ekde **1a de junio ĝis 3a de junio 2018** (vendrede - dimanĉe).

Ĝi estas tradicia aranĝo de krakova esperantistaro kun abunda prelega kaj arta programoj. Komencas samtempe kun datrevenon-festado de lokiĝo de la iama reĝa ĉefurbo de Pollando.

La E-Tagojn de Krakovo organizas Krakova Societo ESPERANTO en la Kulturcentro de Podgórze, strato Sokolska 13, PL-30-510 Kraków, Pollando (http://www.centrumkultury.eu).

Kontakto al organizanto: kse.krakovo@gmail.com
Reta aliĝilo: www.kse.cba.pl/aligxilo
Tranoktebleco: www.kse.cba.pl/tranoktebleco
Provizora programo: www.kse.cba.pl/etagoj/

Ĝis la revido! Organiza Teamo

# 5. Invito al Greziljono, Francujo

Vidu la someran oferton de la franca Esperanto-kastelo Greziljono:

http://gresillon.org/somero

# 6. Esperanto-Fervojista Kongreso en Prerow

**De la 26-a ĝis la 28-a de oktobro 2018** okazos Esperanto-Fervojista Kongreso en Prerow.

Pli detalajn informojn vi povas peti ĉe vorstand@esperanto-nb.de

# 7. Ligiloj

Reneo trovis denove kelkajn ligiloj pri diversaj temoj, kiuj iel rilatas esperanton.

- http://esperanto.net/de/ // Esperanto: die internationale Sprache
- http://esperanto.net/de/film-in-esperanto/ // Filme in Esperanto
- http://kurso.com.br/elshuto.php?de // kurso pri esperanto en la germana lingvo
- https://www.youtube.com/watch?v=UzDS2WyemBI // Esperanto: video pri denaskuloj

Claude Labetaa proponis al li paĝaron de Perigorda Esperantista Grupo, en Francujo.

- Informiloj de la grupo
- Informoj pri ludoj

# 8. Nia informstando

La **1-an de majo 2018** ni triope organizis informstandon en la urboparko.



*Abbildung 5: Edeltraut kaj „Mudder Finksch" kaj "Möller"*



*Abbildung 6: Nia triopo*

# 9. Bicikla karavano al la ĉijara UK en Lisbono

Berlinaj esperantistoj organizas karavanon per biciklo al la UK en Lisbono. Ili ekveturos la 10-an de junio. Pliaj detaloj legeblas en la reto sub http://www.liberafolio.org/2018/04/02/biciklado-el-berlino-al-lisbono/ kaj http://bemi.tejo.org/vokovo/.

Ni deziras al ĉiuj partoprenantoj bonan vojaĝon :-)

# Anschriften / Adresaro

Redakteur: René Philipp, Pablo-Neruda-Ring 69, DE 17235 Neustrelitz.
tlustulimu@web.de (Achtung: René hat außerdem eine neue Emailadresse: rene_philipp_ntz@gmx.de!)
Geschäftsstellen

LAMA, Landesverband MV
DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29/0705
Tel. 0395 422 13 98
Bankverbindung: Inhaber: Landesverband Mecklenburg Vorpommern des DEB,
Sparkasse Neubrandenburg-Demmin, IBAN: DE19 1505 0200 3200 0213 48, BIC:
NOLADE21NBS
e.-Brief: info@esperanto-nb.de

Esperanto-Verein Neubrandenburg e. V. (EVN)
DE-17034-Neubrandenburg, Uns Hüsung 29 /0705
Tel. 0395 422 13 98
e.-Brief: info@esperanto-nb.de